

SOMERO 2004

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2004:3



Rapport från Svenska Esperanto-kongressen i Lesjöfors

Diversaĝaj partoprenantoj de Sveda Esperanto-kongreso.



La bildo montras la kvar estraranojn, kiuj forlasas la Eldona-estraron, tri ordinarajn kaj unu anstatauanton. Ekde maldekstre Franko Luin, Agneta Emanuelsson, Soile Lingman kaj Bertil Nilsson.

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Somero 2004 • 92-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: nordenstorm@glocalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2004: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2003:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*).

Tilläggs-exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgränd 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: nordenstorm@glocalnet.net

När kommer *La Espero* 2004

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 4/5	15 augusti	15 september
Nr 6	15 oktober	15 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Arne Lundkvist, 85 år

I en liten stuga på en stor tomt i Älvsjö föddes Arne den 14 maj 1919. När kriget var slut, kunde min far, som var timmerman, bygga en större villa där jag växte upp. Vid 4 års ålder tog min mor mig till söndagsskolan i Älvsjö Missionskyrka. Efter söndagsskola, bibelskola och konfirmation, var jag med i juniorföreningen och var där styrelsemedlem. Varje sommar var vi på samma juniorläger i olika delar av landet.

Handelsstudenten tog jag vid Frans Schartaus Handelsgymnasium 1939.

Det blev omedelbart militärtjänst och lång beredskapstjänstgöring. 20 mars 1942 började min första längre anställning. Det var vid Midskogsforsens kraftstationsbygge, fyra mil från Östersund. Under min vistelse där deltog jag i ett ungdomsläger i Lofsaldalen 1943.

Jag kunde sedan få anställning vid Väg & Vatten, numera Vägverket. 1947 började min anställning vid Vägförvaltningen i Malmö. Där lärde jag mig esperanto på Esperantohemmet av Jan Ströme. Anna Alamo gjorde reklam för den första kristna esperantokongressen i Tostarp 1948. Under denna kongress lärde jag känna Mijntje van Steenwijk och det blev äktenskap i Rotterdam 1 maj 1951. C.P. Brakke tolkade då från holländska till esperanto. Jag fick förflyttning till Vägförvaltningen i Karlskrona. Där startade jag en esperantokurs på ABF. Det bildades en förening på nio medlemmar. Då min hustru fått anställning som sekreterare på Svensk Veckotidning, kunde jag med henne flytta till en lägenhet i mina föräldrars villa. Det blev flera olika anställningar för mig vid Handelsbanken, Småstugebyrån och från 1955 vid Kreditbanken, som sedan ändrade namn flera gånger. Den heter numera Nordea.

Den första UEA-kongressen för mig var i Malmö 1948. Sedan blev det kongress i Bournemouth 1949. Som en bröllopsresa 1951 kan KELLI-kongressen (för kristna esperantister) i Marktleuthen betraktas. Den var den trevligaste kongressen, då vi alla fick bo i privata hem och hade utflykter varje dag. Reseledare för den svenska gruppen på ett tjugotal personer var Ingmar Gustafsson. Han blev sedan rektor för Karlskoga Folkhögskola och uppmanade Lars Forsman att leda esperantokurser, vilket han fick göra till sin pensionering.

Under årens lopp har jag deltagit i



ett tjugotal UEA-kongresser och lika många KELLI-eller ekumeniska kongresser. I Grupo Esperantista de Stokholmo har jag varit revisor, sekreterare och var kassör för årskongressen 1987, som samlade 220 deltagare.

I den svenska sektionen av KELLI har jag varit omväxlande revisor och kassör. I Stockholmsgruppen av KELLI har jag också varit ordförande. I den internationella styrelsen av KELLI har jag under två perioder varit styrelsemedlem.

Jag har också varit medlem i Brännkyrka Hembygdsförening och en av dess revisorer. I Älvsjöökretsen av Röda Korset har jag varit en av revisorerna under femton år.

Värnamo Nyheter fann det märkligt, att jag deltog i en datakurs vid 82 års ålder. Nu skickar jag ofta e-post och surfar på nätet.

Då min hustru var 42 år fick vi en son, som nu är dataingenjör i Växjö. Han gifte sig 1984 med Kristina Boberg från Vaggeryd i dess missionskyrka. Tillsammans har de en son och en dotter, som adopterats från Colombia.

Att jag flyttade från Älvsjö till Jönköping, berodde på att kunna hjälpa Karl Buremo med KELLI:s Medlemsblad och att oftare kunna hälsa på sonens svärföräldrar. 1997 deltog jag i en sensommarvecka på Strandgården. Jag lärde där känna Rut Johansson och hennes syster från Värnamo. Det blev anledning till att jag flyttade till Värnamo och jag tänker stanna i mitt radhus, så länge jag lever och få ha en god hälsa.

Arne Lundkvist

PS. I stället för eventuella 85-års-gåvor: Ge en gåva till Svenska Esperantoförbundet.

Vere valora kongreso en Lesjöfors

Ĉijare la kongreso de SEF estis vere valora travivaĵo. Mankis severe seriozaj prelegoj de bone konataj esperantistoj, sed ĝuste pro tio ni havis sufiĉe da tempo por diskuti gravajn aferojn por la estonteco.

Kelkaj el la partoprenantoj alvenis jam merkrede por libertempoj kaj interkonatiĝi kun novaj kaj malnovaj geamikoj.

Mi alvenis jaŭde elkore bonvenigita jam ĉe la pordo! Lennart staris tie kiel ĉiam por brakumi nin. Jaŭde estis diskutoj pri la plano esperantigi Filipstad/Lesjöfors ktp, kaj vendrede estis ekskursita tago. Dum tiu tago okazis ankaŭ la jarkunveno de SEJU, kaj la gejunuloj diligente laboris dum multaj horoj, kaj ili ankaŭ helpis al Lennart en la kuirejo.

Sabate estis la tago por ĉiuj aliaj jarkunvenoj, Eldona, ILEI kaj SEF. Nur kunveno de KELI ne okazis.

Jam de la komenco mi povis senti, ke la ĉeestantoj vere volis pripensi kaj diskuti la estontecon de la Esperantomovado en Svedio. Multaj esperantistoj venis por kongresi, sed la plimulto de nia esperantistaro bedaŭrinde mankis! Ne nur la etoso estis bona; la naturo kaj la vetero, iom malvarma, konkursis por fari belan kaj bonan impreson. Multaj ankaŭ laboris kaj promenis kaj la novan saŭnon kelkaj uzis ĉiuvespere!

Estis vere agrable interparoli kun la aliaj kaj senti la pozitivan sintenon al la eblecoj trovi novajn kaj retrovi malnovajn samideanojn. Oni dubas pri la intereso de gejunuloj membriĝi en organizaĵoj ĝenerale kaj provis trovi alternativojn por ili. Multaj lernas Esperanton perrete kaj tuj uzas siajn novajn konojn por kontaktoj retaj aŭ veraj en Esperantujo.

Mi mem interesiĝas pri la svedaj esperantoklubo! Ili estas tre variaj, kaj tio certe estas bona! La plej valora estas, ke homoj volas ĉeesti kaj sentas perdon, se ili maltrafas iun arangĝon. La kluboj estas tre valoraj, ne nur pro la lingvoekzerco, sed ankaŭ pro sociaj kaj aliaj kialoj. Same mi opinias pri kongresoj kaj konferencoj! Estas valore renkontiĝi! Babilu pri ĉio kaj interkonatiĝi. Rigardi librojn, gazetojn, aŭdi pri agoj en aliaj partoj de nia lando, en UEA kaj aliaj organizaĵoj.

Tre frappe estis ĉijare, ke ĉiuj organizaĵoj pritraktis siajn statutojn!!! Por ILEI ne estis trovita statuto, do,



Bertil Nilsson informas pri Esperanto en universitatoj.

oni proponis, ke ILEI havu almenaŭ minimuman statuton pri jarkunveno, estraro ktp. Tamen, la horoj ne sufiĉis por tion finfari. Multe okazas en la ekstera mondo, kaj ni devas esti akorditaj. Dum multaj jaroj ni opiniis, ke ĉio bone funkcias kvankam la statutoj ne estas akorditaj al la nuna tempo kaj ties novaĵoj. Do, nun ĉiuj subite vekigis, kaj tio estas bona signo por la estonteco.

La prezidanto Agneta Emanuelsson bonvenigis al la kunveno de Eldona Societo Esperanto, inaŭguris ĝin kaj proponis Franko Luin kiel tagprezidanton de la kunveno kaj menciis la decidon de la estraro pri Bertil Nilsson kiel protokolanto. Franko Luin lerte gvidis la jarkunvenon, kaj Bertil Nilsson protokolis. La agadraporto de Eldona estis nekutime granda pro la nun preskaŭ finfarita rekonstrua kaj novorientiga laboro farita dum la lastaj jaroj. Preskaŭ tute nova estraro estis elektita. La kunveno akceptis unuafokan ŝanĝon - krom ŝanĝo en la lasta paragrafo - de la statutoj laŭ propono de la estraro.

La dua jarkunveno estis tio de ILEI. La ordinara prezidanto malĉeestis. Bertil Nilsson, estrarano, enkondukis kaj sekretariino fariĝis Ann-Louise

Åkerlund. La nova estraro iom malgrandiĝis. Sjoerd Bosga informis pri la internacia ILEI, kie li nun estas kasisto. Li precipe menciis la revuon Juna Amiko, kiu bezonas pli da abonantoj en Svedio. La internacia ILEI-konferenco okazos en Bratislava, Slovakio, inter la 14a kaj la 21a de aŭgusto.

Postlunĉe komenciĝis la jarkunveno de SEF. Franko Luin bonvenigis nin, kaj Sten Sveninius prezidis. Multaj mocioj de la klubo en Upplands Väsby estis prezentitaj kaj unu tripropona mocio de Esperantoförbundet. Diskuto rekomenciĝis dimanĉe ekster la jarkunveno. La mocio de Eldona estis admono al SEF serĉi la plej malmultekostajn metodojn por ekhavi novajn esperantistojn.

La lasta punkto de la programo estis dimanĉa lunĉo, kaj poste ni aplaŭdis al Lennart por danki lin!!!

Agneta Emanuelsson

Novaj estraroj

Post la elektoj en la jarkunveno de SEF en Lesjöfors la estraro havas jenankonsiston:

Prezidanto: Franko Luin; Estraranoj: Sjoerd Bosga (nova); Katja Ignatieva (nova); Fredrik Olofsson (nova); Wim Posthuma; Martin Strid; Anstataŭantoj: Roland Lindblom, Leif Nordenstorm.

Kiam ĉi tiu numero de La Espero estis pretigata, ne okazis ankoraŭ disdivido de taskoj inter la estraranoj.

SEJU nun havas la jenan estraron: Daniel Granello; Torun Jansson; Magnus Henock; Carl Mäsak; Kristoffer Larsson; Katja Ignatieva; Lovisa Gustafsson

Bertil Andreasson pro familiaj kaŭzoj ne povis veni. La jarkunvenon de ILEI glate gvidis Bertil Nilsson.

La elektoprepara komitato trovis ke la Sveda sekcio de ILEI tute ne havas regularon montrantan celon, strukturon kaj mandatperiodon. La ekŝiŝinta prezidanto preparis por la jarkunveno proponon pri regularo, sed tempo ne sufiĉis por pritrakti ŝin.

Por la elektoj ni sekvis la proponitajn periodojn t. e. la duonon de la estraro por 2 jaroj. Ni elektis: Lars Forsman, prez. (1jaro), Jill Hillford, estrar. (2j); Inga Johansson estrar. (1j); Fredrik Olofsson estrar. (1j); Siv Burell, anstat. (1j); Vakanta posteno, anstat (2j)

Espereble la novelektita estraro

pritraktos la proponitan regularon dum la jaro por ke oni povu aprobi ŝin dum venonta jarkunsido.

Jarkunsido SEF

Komence estis plendoj, ĉar la membroj ne ricevis la dokumentojn monaton antaŭ la kunveno, kiel estas skribite en la statutoj. Tial oni devis uzi valoran kunsidtempon por tralegado.

La revizoroj atentigis pri kelkaj gravaj malbonaĵoj de la estraro, sed tamen proponis pri malŝarĝo kiu estis aprobita.

La estraro ricevis taskon pritrakti kaj proponi laborplanon por 2004/2005. La jarkunveno decidis pri statutŝanĝo por ke la membraro konsistu de individuoj kaj ne de kluboj. Tiu ŝanĝo devas esti pritraktita ankoraŭ unu fojon dum jarkunveno por esti valida. Pluraj aliaj proponoj estis lasitaj al la dimaĉa diskuto. La jarkunvenon bonege gvidis Sten Svenonius.

Projekto Lesjöfors

Franko informis pri la celo de la projekto. Multaj bonaj ideoj estis proponitaj. Finfine ni decidis formi laborgrupon, kies unua tasko estas proponi strukturon kaj la ĉefajn unuajn paŝojn. La laborgrupo: Bengt Nordlöf (kunvokanto), Lennart Svensson kaj Per-Åke Sandberg. Torun Jansson deklaris sin je ilia dispono.

Jarkunveno Eldona

Preskaŭ la tuta estraro ŝanĝiĝis. Agneta Emanuelsson, Franko Luin, Bertil Nilsson kaj Soile Lingman ekŝiŝis. La nova estraro: Joakim Enwall, Siv Sjögren, Sabbak Sinnah, Gunnar Gällmo, Leif Nordenstorm (anst), Bengt Nordlöf (anst).

La ekŝiĝa estraro faris bonegan raporton por ke la nova estraro bone povu plenumi sian taskon.

Laŭ La Hirundo

Akcepto por membroj de Rondo Langlet

Dum la jarkongreso de SEF en Lesjöfors la estraro preparis malgrandan akcepton por la membroj de Rondo Langlet, kiuj ĉeestis la kongreson. Skriban inviton ricevis jam pli frue ĉiuj "rondanoj". Dum la akcepto ili povis gustumi fruajn fragojn kun glaso da ĉampano kaj babilis kun la ĉeestantaj estraranoj.

Rondo Langlet estas tre speciala rondo de apogantoj de SEF, kiu per regulaj pagoj (minimume 100 SEK monate aŭ 1200 jare) apogas la organizon finance. Informojn, kiel aliĝi al la rondo, donas Kaisa Hansen, retadreso: kak@bredband.net.

Franko

En Roterdamo

Se vi bone studis kaj lernis nian lingvon kaj volas renkonti personojn kiuj brile regas Esperanton, vi kaptu la okazon viziti Roterdamon venontjare dum Malferma Tago.

Mi kaptis la ŝancon ĉi-jare kaj vizitis Roterdamon dum tri tagoj. Mi alvenis vendrede la 23-a de aprilo, partoprenis en la aranĝo la 24-an kaj flugis hejmen vespere dimanĉe.

Inter la 70 vizitantoj troviĝis la ok estraranoj de UEA, ĉar ili venis ankaŭ por estrarkunsidoj.

Invititaj estis Zofia Fornalowa el Polando kaj la eksa redaktoro de la UEA-organo "Esperanto", István Ertl.

Por trovi tranoktejon mi telefonis al la reinstalita nova Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller. Li rapide aranĝis ke mi ricevos ĉambron en la speciala "Simo-telo". Simo Milojevic dum multaj jaroj estis Ĝenerala Direktoro. Nun li estas pensiulo kaj

daŭre loĝas en Roterdamo. Li havas belan kaj plurĉambran apartamenton, kaj li akceptas konatojn kaj malnovajn amikojn kiel min.

La estro de Libro-Servo gvidis min al Simo. La vespermanĝo estis preta kaj Ionel Onet regalis per forta trinkaĵo el sia iama hejmlando Rumanio.

Poste venis alia invitita gasto, la eksa redaktoro István Ertl. Li antaŭ nelonge tradukis tre interesan libron, kiu nun estas presita kaj vendopreta. Temas pri libro kiu ricevis la titolon "Ĉu nur-angla Eŭropo?" Tiun libron verkis la brito Robert Phillipson, esplora profesoro en la fakultato de la angla, komerca skolo, en Kopenhago. Phillipson estas konata por esperantistoj pro sia partopreno en du esperantokongresaj simpozioj. Lia libro estas absolute legenda, se vi volas vidi kiel la angla pli kaj pli superas la aliajn lingvojn en EU. (254 paĝoj).

La ĉefa temo de la taga programo koncernis la demandon pri la

disvastiĝo de la angla en EU kaj la eventualaj ŝancoj por Esperanto.

Kion fari kaj kiel fari por vekti interreson por Esperanto? Renato Corsetti diris tre saĝe, ke nia eventuala sukceso ĉe parlamentanoj de EU dependas da fortaj kaj kreskantaj esperantomovadoj en ĉiu EU-lando.

Zofia Fornalowa faris du prelegojn. Mi auskultis tiun pri la filino de Zamenhof, Lydia. Zofia plene regas Esperanton kaj profunde esploris siajn temojn, sed ŝia entuziasmo prezenti kaj prelegi, kaŭzas ĝenon pro hasteco kiu siavice kaŭzas oftajn stumblojn ĉe diversaj vortoj kaj silaboj.

Multaj utiligis la ŝancon aĉeti librojn je 10-procenta rabato. Mi mem aĉetis kelkajn librojn por vendo ĉe Esperanto-Centro de SEF.

Mi reflugis al Stokholmo, plena je bonaj memoroj kaj kun peza valizo, parte pro tri pezaj Nova-PIV. Aĉetu ilin!

Roland Lindblom

Kris i rörelsen eller inte?

ANONCETOJ

DEZIRAS
KORESPONDI

Rainer Haupt,
Kaemmererufer 10,
DE-22303 Ham-
burg, Germanio.

Se vi interesigās pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al: Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042 Japanio.

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn. Estas rifuzataj monhelpa peto kaj propono je komerco. Aldono de 2 internaciaj respondokuponoj estas bonvena por faciligi nian laboron.

Deziras korespondi: 60 jara advokata vidvino. Havas filon 30 jaran. Li kaj lia edzino volas labori kiel laboristoj en via lando. Min interesas modo, historio, politiko, sporto, turistiko ktp. Janina Jarecka, Poznan, Rynek Lazarski 9 n z 15, Pollando.

Fortsättning från debatten i *La Espero* 2004:1.

Inte kris överallt

Esperantorörelsen i Sverige har problem – eller befinner sig i kris. Så inleder Bengt Nordlöf en debattartikel i *La Espero* 2004:1. När man sedan läser artikeln ser man att den handlar om något helt annat. Den handlar om att Svenska Esperantoförbundet är i kris. Och om en före detta ledamot i SEFs styrelse säger så, då antar jag att det är sant.

Men betyder det att Esperantorörelsen i Sverige är i kris? Definitivt inte. Rörelsen består av ett konglomerat av organisationer, stora och små, och långt ifrån alla dessa befinner sig i kris. Låt mig tala för Esperantoförlaget. Förlaget är inte i kris. Förlaget har knappast ens problem, om man undantar sådana som importeras från SEF.

Nordlöfs artikel ger alltså inte en korrekt bild av esperantorörelsen. I värsta fall kan den bidra till att framkalla mera kris. På vilket sätt? Låt mig beskriva det så här:

Om en viss del av konglomeratet esperantorörelsen befinner sig i kris, kan esperantisterna reagera på ettdera av två sätt. Antingen skynda att bidra till den krisdrabbade delen med alltmer pengar och alltmer arbete. Kasta goda pengar efter dåliga, brukar man säga i näringslivet. Eller kan esperantisterna säga sig, att då måste vi satsa alltmer på de friska och krisfria delarna av esperantorörelsen.

Esperantisterna har nästan hundra procentigt valt den första vägen, vilket är ett effektivt sätt att förlänga krisen i det oändliga. Jag konkretiserar med ett exempel. Det kapitaltillskott i form av gåvor och andelsköp, som Esperantoförbundet under sin 85-åriga existens fått av svenska esperantister, motsvarar ungefär vad SEF får in under fyra år. Och ändå befinner sig SEF i kris, men inte förlaget!

En annan omständighet, som svenska esperantister inte tycks vara medvetna om är denna: Praktiskt taget allt som SEF gör för att skaffa fler esperantister i Sverige, kan göras 20 % billigare av kooperativen Esperanto-Gården och Esperantoförbundet därför att dessa företag är momspliktiga. Varför görs då inte

detta på det billigare sättet? Bra fråga, som man säger, när det inte finns ett bra svar.

SEF kan inte självt ta sig ur sin kris. Vägen ur krisen går genom att svenska esperantister satsar sitt arbete och sina pengar på kooperativen, som i sin tur skapar nya esperantister, vilket ger SEF en bredare rekryteringsbas. Om då SEF lyckas göra sig självt attraktivt för dessa nya esperantister, kommer problemet att lösas och krisen att upphöra.

Bertil Nilsson

Jo, det är kris

Ingen vet väl precis hur många esperantister det finns i Sverige, men låt oss anta att det rör sig om mellan ett och två tusen. Dessa utgör då den rörelse, som en gång var en folkrörelse.

Sannolikt är det så att det försvinner fler gamla esperantister varje år, än det kommer till nya. Envar förstår följden av detta. Är inte detta redan en krissituation så blir det, om utvecklingen inte vänder.

För den generation som närmar sig medelåldern eller är äldre, var det naturligt att organisera sig i klubbar, föreningar och förbund. Det betydde – för de flesta – SEF och anslutna lokalorganisationer. Vid sidan av SEF finns SLEA. Och det finns en paraplyorganisation, Esperantoinstitutet. Flera fackorganisationer har också funnits, varav några redan upphört och någon finns kvar, men tynande.

Vad jag förstår utgår Bertil Nilsson ifrån att organisationerna lever sitt eget självständiga liv och, om man så vill, är självändamål.

Jag menar att en esperantorörelsen, som alla rörelser, består av individer. Flertalet av dessa har bildat SEF och SLEA för att i demokratisk ordning tillvarata sina intressen som esperantister. Dessutom har de som vill att rörelsen ägnar sig åt ekonomisk verksamhet bildat kooperativa föreningar, Eldona och Esperanto-Gården. Det är nog viktigt att inte glömma, att det i mycket stor utsträckning är samma esperantister som behöver ett demokratiskt förbund, som vill ha bokutgivning och som vill ha en egen kurs- och konferensgård.

Jag vidhåller att rörelsen är i kris.

Först och främst därför att tillväxten av esperantister är liten till en redan mycket liten numerär. För det andra, och åtminstone delvis som en följd, är ett genomgående drag svårigheten att finna kompetenta och arbetsvilliga styrelseledamöter. (För att vara helt konkret talar jag här om SEF, Eldona och Esperanto-Gården under den tioårsperiod som jag varit aktiv på riksplanet.)

För det tredje så har rörelsen ekonomiska problem. SEF:s problem är välkända. Esperanto-Gården däremot utvecklas åt rätt håll, varje år ökar antalet gästnätter och därmed intäkterna, som över tiden täcker kostnaderna (med små variationer från år till år). Men gården är, enligt min uppfattning, alltför beroende av ideellt oavlönat arbete. Några ekonomiska buffertar finns ännu inte. Men ska man se på rörelsen styckevis och delat, så är det riktigt att E-G inte är i ekonomisk kris.

En viktig delförklaring till detta är att den vänder sig till ickeesperantister, alltså helt vanliga turister, för att skaffa intäkter.

Vad gäller förlagsföreningen så låtsas Beril inte om en mycket väsentlig sak. Eldona fick för några år sedan ett arv på i runda tal 180 tusen kronor. Innan dess fanns nästan inte pengar till porto när beställningar kom. Det var ekonomisk kris. Nu är det bättre, men om arvet fortsätter att krympa i den trakt det uppenbarligen gjort hittills, så är det en tidsfråga när det åter blir kapitalbrist och problem med nyutgivning. Kris om man så vill.

Bertil Nilsson skriver: "Nordlöfs artikel ger alltså inte en korrekt bild av esperantorörelsen. I värsta fall kan den bidra till att framkalla mera kris."

Naturligvis är min avsikt inte att framkalla mer kris, utan det motsatta. Jag anser att svårigheter inte kan undkommas genom att de undanhålls ifrån de berörda medlemmarna. Tvärtom, menar jag, är det livsfarligt att för de medlemmar, som inte tillhör de innersta cirkelarna eller har möjlighet att komma till årsmötena, hemlighålla problem om sådana finns. Jag vet att en del inte delar min uppfattning om detta.

Men demokrati handlar inte minst om upplysning. Endast upplysta kan diskutera problem och finna lösningar.

Bengt Nordlöf

Seksa signifo de vortoj kaj radikoj en Esperanto

Enkonduko

Ekzistas en Esperanto tre multaj radikoj kaj O-vortoj por homoj kaj bestoj. Oni povas dividi ilin en tri grupojn:

- Virseksaj radikoj
- Inseksaj radikoj
- Sekse neŭtraj radikoj

La aparteno al tia grupo estas afero de la propra signifo de ĉiu unuopa radiko, kaj ne estas io gramatika aŭ principa. La signifo de ĉiu ajn radiko Esperanta estas arbitra kaj aparte lernenda - same kiel en aliaj lingvoj.

El la tri grupoj la neŭtra estas sendube la plej granda. Ĝi estas nefermita klaso, kiu daŭre akceptas novajn membrojn. La vira grupo estas multe pli malgranda, kaj estas pli fermita. La ina grupo estas la plej malgranda. Eventuale ĝi povas akcepti pliajn membrojn.

Sekvos ĉi tie sufiĉe detala inventaro de la Esperanta provizo de homaj kaj bestaj radikoj. Enestas kaj oficialaj kaj ne-oficialaj radikoj. Enestas kelkaj radikoj, kiuj estas ekstreme maloftaj aŭ specialaj. Inkluzivado en la listoj ne esprimas ian opinion pri la taŭgeco de la koncernaj radikoj. Temas nur pri fiksado de iliaj signifoj. Post la listoj sekvas gravaj komentoj kaj nuancigoj.

La klasado spegulas la uzon kaj preferojn de Bertilo kaj diversaj aliaj Esperantistoj, kun kiuj Bertilo konsiliĝis. Ĝi neniel pretendas esti io perfekta aŭ deviga por aliaj. La lingvo estas ĉi-kampe neunueca, kaj ne ekzistas ia simpla vero pri ĉiuj ĉi tiaj radikoj.

Kompreneble ĉi tie temas nur pri Esperanto kaj Esperantaj vortoj. En aliaj lingvoj estas alie, kaj iliaj respondaj vortoj povas havi aliajn signifojn kaj uzojn rilate sekson.

Inventaro

Viraj radikoj:

o Diversaj evidente viraj radikoj: *viro, sinjoro, fraŭlo, knabo, bubo, ĝentlemano, masklo, ĝigolo, inkubo, eŭnuko.*

o La sufikso *-ĉj-*.

o Familiaj radikoj (minus la ĝenerala *parenco*): *patro, frato, filo, avo, nepo, nevo, onklo, kuzo, fianĉo, edzo, vidvo, orfo, konkubo...*

o Nobelaj kaj similaj altranguloj (minus la ĝenerala *nobelo, vasalo* kaj su-

vereno): *reĝo, caro, princo, kavaliro, grafo, duko, lordo, markizo, barono, senjoro, suzereno, siro, ŝaho, mikado, emiro, ŝoguno, daimio, samurajo.*

o Kelkaj religiuloj: *monaĥo, abato, papo, rabeno, imamo.*

o Specialaj virbestaj radikoj: *taŭro, okso, kapono, stalono, boko.*

Inaj radikoj:

o Evidente ina: *femalo.*

o La sufiksoj *-in-* kaj *-nj-*.

o Diversaj inaj radikoj: *damo, matrono, primadono, furio, amazono, gorgono, nimfo, sukubo, megero, almeo, putino, meretrico, hetajro, geĉo, begino, madono, sireno, muzo, parco.*

Sekse neŭtraj radikoj:

o Ĝeneralaj bestaj kaj homaj radikoj: *besto, birdo, insekto, fiŝo, homo, persono, infano, adolto, idioto, albino, animalo...*

o La sufiksoj *-ul-, -ist-, -an-, -estr-* kaj *-id-*.

o Participoj kun O-finaĵo: *...anto, ...into, ...onto, ...ato, ...ito, ...oto.*

o Ĉiuj bestospecioj: *kato, leono, tigro, pantero, linko, ĉevalo, azeno, zebro, hundo, lupulo, vulpo, koko, ansero, pase-ro, alaŭdo, struto, ezoko, moruo, rajo, formiko, araneo, muŝo, moskito, kulo...*

o Diversaj ne-familiaj homaj rilatoj: *amiko, kolego, gasto, najbaro, membro, ĉefo, kamarado, kompano...*

o Profesioj kaj diversaj homaj roloj (minus multaj jam menciitaj ĉiantaŭe): *piloto, advokato, aktoro, sekretario, kelnero, tajloro, ŝoforo, kirurgo, geografo, redaktoro, vakero, studento, emerito, prolet(ari)o, sklavo, mastro, majstro, moŝto, prezidento, diktatoro, ministro, veziro, nobelo, vasalo, suvereno, demokrato, adepto, disĉiplo, turisto, vagabondo, fripono, bandito, pirato, heroo, martiro, atleta, pasaĝero, viktimo...*

o Militistoj: *soldato, oficiro, kaporalo, leŭtenanto, kapitano, majoro, kolonelo, generalo, marŝalo, admiralo, adjutanto, hetmano...*

o Diversaj religiuloj: *pastro, episkopo, kardinalo, anakoreto, cenobito, diakono, apostolo, katoliko, bikŝuo, bonzo...*

o Gentoj, landanoj, rasoj k.s.: *Anglo, Svedo, Ruso, Japano, Ĉino, Arabo, Cigano, Eskimo, Lapono, Negro, Judoj, Hebreoj, Apaĉoj, Germanoj, Slavoj, Teŭtonoj, Frankoj, Gotoj, Saksoj, indiĝenoj, aŭtoktonoj...*

o Supernaturaj kaj fabelaj estaĵoj: *dio, diablo, anĝelo, feo, elfo, koboldo,*

trolo, gnomo, ogro, fantomo, vampiro, demono, dajmono, silfo, genio, nikso, ĝino, kerubo, serafo...

Komentoj

Ĉe multaj radikoj la uzado bedaŭrinde estas hezita aŭ miksa, kaj niaj vortaroj donas difinojn, kiuj ne ĉiam klare montras, ĉu temas pri speco de homo/besto, speco de viro, aŭ speco de ino. Tiu ĉi prezento estas intencita kiel eta kontribuo al eventuala malpliigo de tiu strange kaosa situacio.

La celo ne estas kontraŭbatalado de seksismo en la lingvo. Tiu temo ja ligiĝas al ĉio ĉi, sed ne temas unuavice pri tio, sed pri ordigado kaj pliumecigado de iom kaosa vortokampo.

La signifo de radiko ne estas ŝtonefiksa. La lingvo povas evolui, kaj ankaŭ fakte evoluas kaj ŝanĝiĝas. Ĝenerale estas konsilinde neniel provi ŝanĝi, reformi aŭ modifi la seksan signifon de radikoj, por kiuj la uzado kaj signifo estas stabila kaj klara - tio ja nur pliigas la kaoson! Sed en ĉiuj okazoj, en kiuj la signifo kaj uzado estas malklara, neunueca aŭ ŝanceliĝanta, ŝajnas konsilinde doni al la radiko neŭtran signifon. Precipe ĉe profesioj la evoluo de la modernaj socioj ĉiam pli kreas bezonon de vortoj sekse neŭtraj.

Multaj sekse neŭtraj vortoj (ekz. por profesiuloj) estas tradicie, kaj ankoraŭ de multegaj Esperantistoj, uzataj en kvazaŭ-vira maniero: En tia uzo, kiam oni parolas pri certa tia persono, kies sekso estas konata kaj ina, oni rutine aldonas IN-sufikson. Tiel la simplaj formoj de tiaj vortoj praktike funkcias kiel viraj. Sed en multe-nombra formo kaj en okazoj ĝeneralaj, kiam oni parolas pri persono, kies sekso ne estas difinebla aŭ difininda, tiaj vortoj estas tradicie kaj ankoraŭ uzataj sen seksa signifo.

Tiumaniere oni ne uzas la nepre virajn radikojn, kiuj konservas sian viran signifon ankaŭ en multe-nombra kaj en ĝeneralecaj frazoj. (Nur en iaj figuraj esprimoj iuj el la familiaj viraj vortoj foje aperas kiel reprezentanto de tuta grupo inkluzive la respondajn inojn: *la filoj de Israelo, la nepoj vin benos...* Tiam ankaŭ cetere la koncerna vorto estas uzata kun signifo pli vasta ol ordinare: per *la filoj de Israelo* oni ja ne celas nur liajn efektiv-

vajn filojn, sed ĉiujn postajn generaciojn.)

Multaj Esperantistoj nuntempe permesas al si uzi neŭtrajn vortojn neŭtre en ĉiaj okazoj. Por iuj tia uzo estas eĉ tiom kutima kaj ordinara, ke ili apenaŭ konscias, ke tio estas io pri-komentinda. Estas emfazende, ke tio prezentas nenion esence novan en nia lingvo: Tiaj radikoj kaj vortoj, kaj tia uzo, ekzistas en Esperanto de la plej frua tempo. Tio, kio estas nova, estas draste pliiginta uzo de tiaj vortoj en tute neŭtra maniero ankaŭ en unu-nombro, kaj ankaŭ kiam temas pri konkreta persono aŭ besto. Sed jam en la plej frua tempo iuj neŭtraj vortoj uzigiĝis ĝuste tiel (*homo, infano, persono, viktimo...*).

Ĉiu plene rajtas daŭrigi la tradicion kvazaŭ-viran uzadon de neŭtraj vortoj, sed ĉiu ankaŭ rajtas uzadi ilin plene sensekse. La du manieroj uzi la neŭtrajn vortojn ne vere konflikta inter si. Ili ambaŭ baziĝas sur la propraj signifoj de la koncernaj vortoj, kaj estas ambaŭ tute logikaj kaj konformaj

al la reguloj de la lingvo. Temas simple pri personaj preferoj, ĉu insisti pri sekso aŭ ne. Por iuj personoj sekso ne estas tre nepra kaj grava informero, por aliaj ĝi tre ofte estas.

Iuj radikoj montras homan rolon, kiu estas ĉiam okupata de nur unu el la seksoj, ekz. viroj, kvankam nenio vere malebligas virinon en tia rolo. Tre frapa ekzemplo estas la vorto *papo*. Sed tio ne nepre signifas, ke la *radiko mem* estas vira. Por ne senhelpe konfuzi la aferojn necesas ĉiam memori la distingon inter la *seksa signifo de vorto*, kaj la *seksa de tiu, al kiu vorto referencas*. Oni povas facile imagi, ke ekz. religia sekto starigus propran papon, kaj uzus aliajn regulojn, kiuj permesus, ke ankaŭ virino estu papo. Pri tiaj radikoj eblas ankaŭ diri, ke la seksa signifo ankoraŭ ne estas tute klare difnita, ĉar neniam aperis bezono. En la ĉi-antaŭaj listoj *papo* estas tamen klasita kiel vira. Aliaj ekzemploj estas la vortoj *soldato* kaj *pastro*. Por tiuj, kiuj konas nur virajn

soldatojn kaj nur virajn pastrojn, tiuj radikoj povas ŝajni per si mem klare viraj, sed en iuj landoj ja ekzistas ankaŭ inaj soldatoj kaj inaj pastroj. En la ĉi-antaŭaj listoj *soldato* kaj *pastro* estas klasitaj kiel neŭtraj. Tiaj radikoj ekzempligas la multajn okazojn, en kiuj la klasado estas tre malfacila. La ĉi-antaŭa inventaro ne pretendas montri ĉiudetale perfektan solvon.

Oni nepre memoru, ke ne ĉiuj radikoj estas dubsencaj aŭ limokazaj. Multaj, verŝajne eĉ plej multaj, el la ĉi-antaŭe inventaritaj radikoj havas signifon tute klaran kaj senduban. Sur tiu bazo de stabilaj kaj klaraj vortoj necesas konstrui. Nenio utila estas atingebla per provoj reformi kaj ŝanĝi tiujn partojn de la lingvo, kiuj estas stabilaj kaj klaraj. Utilaj ŝanĝoj kaj modifoj povas koncerni nur radikojn kaj vortojn, kiuj estas nun neklaraj kaj nestabilaj.

Bertil Wennergren

Laŭ la hejmpaĝo www.bertilo.com Publikigita kun permeso.

TRA LA MONDO

En norvega radio

Merkredon la 14-an de aprilo, en NRK P2, en la programo "Dagsnytt atten", okazis debato inter Per Egil Hegge, redaktoro de Aftenposten, kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen, vicprezidanto de NEL. La programon gvidis Hans-Wilhelm Steinfeld. La debaton kaŭzis reago al en-gazeta aserto de Hegge, ke E-o estas "tedega", ĉar ĉio estas antaŭdirebla, malkiel en etnaj lingvoj. En la debato Hegge komparis E-on kun "russenorsk", piĝina lingvo, kaj asertis, ke E-o ne povas havi valoran literaturon. Eggesbø refutis tion. Hegge agnoskis kiel meritan la fakton, ke E-o transvivis pli ol 100 jarojn, kaj nek li nek Steinfeld estis sencia pri E-o. La debato ŝajnis serioza kaj pli sobra ol pluraj aliaj debatoj de Dagsnytt atten.

Otto Prytz

Amsterdamaj studentoj al Pekino

Ĉi-somere, la universitato de Amsterdamo, Nederlando, sendos du studentojn pri lingvistiko al la Universala Kongreso en Pekino por la plenumo de surloka esportasko rilate la intonacian fenomenon en Esperanto. La studenta duopo venkis konkurson, kies premio estas la staĝovojaĝo al la

UK. La Amsterdama universitato jam antaŭ unu jaro agnoskis la Universala Kongresojn kiel formalan stagejon. Per sia esplorraporto la studentoj akiros kreditpoentojn konforme al la normalaj universitataj reguloj.

Wim Jansen

Dana jarkunveno

Vendredon la 23-a de aprilo mi kaj mia dana amikino veturis per trajno al Aalborg en norda Jutlando. Ni estis survoje al la jarkongreso de DEA – Dana Esperanto-Asocio. En Aalborg ni tranoktis ĉe esperantistino Karen Jørgensen.

Aalborg situas ĉe Limfjorden kaj estis grava loko por la vikingoj. La kongresejo estis junulara gastejo – samtempe konferencejo – proksime de malgranda plezurhaveno tuj apud la urbo. La vetero dum sabato estis mirinda, kaj ni post la vespera programo promenis laŭ la marbordo.

La programo dum la tago estis altkvalita kaj treege interesa. Unue la konata lingvisto Robert Phillipson en bela kaj klara dana lingvo prelegis pri "Lingva politiko: kiuj utopioj estas realismaj?" Li inter alie rakontis, ke en EU oni havas malsamajn opiniojn pri lingvoj kaj lingvopolitiko kaj ke la temo estas tikla. Li raportis, ke la dana lingvopolitiko neglektas la lingvojn de la enmigrintoj kaj ne zorgas pri plurlingvismo. Post la prelego ni havis la bonŝancon aĉeti lian libron "Ĉu nur-angla Eŭropo?", ĝuste la

saman tagon aperanta en esperanta traduko de István Ertl.

Post kafopaŭzo Birthe Lapenna faris prelegon pri "La du konceptoj de Ivo Lapenna: 'Aktiva Neŭtraleco' kaj 'Humaneca Internaciismo' ". Anstataŭ mem interpreti la pensojn kaj ideojn de Ivo Lapenna ŝi uzis liajn proprajn vortojn en zorge elektitaj citaĵoj. Pri neŭtraleco Ivo Lapenna opinias, ke *neniam ekzistis, nek povis ekzisti homoj plene neŭtralaj*. Ĉiuj estas influitaj de sia ĉirkaŭaĵo. "Ne do societoj de neŭtralaj esperantistoj, sed neŭtralaj societoj de esperantistoj."

La tria interese programopunkto dum sabato estis ne vera prelego, sed Eliza Kehlet libere kaj atentokapte rakontis pri siaj "Praktikaj spertoj kiel enterpretisto en Bruselo". Ni lernis pri diversaj formoj de interpretado – postsekva, samtempa, simetria, relaksa kaj revena (nesimetria) – kaj iomete konatiĝis kun la laboro en la Eŭropa Parlamento.

La dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉita al la ĝeneralkunvenoj de DEA kaj de la revivigita junulara organizo DEJO. Ileana Schröder estis reelektita kiel prezidanto de DEA. La laborplano de la asocio sekvas tiun de UEA pri Informado. Instruado kaj Utiligado. DEA, helpe de la Ministerio pri Edukado, eldonis novan version de la "ŝlosilo" kaj renovigis sian hejmpaĝon. Ekzistas planoj meti la organon "Esperanto en Danio" en la hejmpaĝo. Oni organizos kursojn por komentantoj, daŭrigantoj kaj instruantoj, laŭeble en kunlaboro kun SEA (Sunda Esperanto-Agado).

Ann-Louise Åkerlund

Mencio pri e-libroj en VI

La sveda revuo VI, eldonata de la sveda koopera movado, havas en sia plej lasta numero unukolumnan artikolon pri la elektronikaj libroj, kiujn eldonas Franko Luin (www.omnibus.se/eBoklagret). La artikolo temas pri svedlingvaj e-libroj, sed aperas mencio, ke li ankaŭ eldonas e-librojn en Esperanto kaj la slovena lingvo.

Irja Kaponen

Esperanto på Moderna Museet

Lördagen den 8 maj var det fredshappening på Moderna Museets Zon Moderna: ett minst sagt späckat program från kl 12.00 till kl 18.00 med programpunkter som var max 30 minuter. Kl 17.05 stod det på programpunkten "Kaisa Hansen med familj lär ut Esperanto" Under det namnet fick Roland Lindblom, Ole & Kaisa Hansen känna sig som en del i Esperanto-familjen.

Ole & Kaisa Hansen presenterade Esperanto i Väsbys utställning (18 skärmar) modifierad så att den speglade esperanto i ett fredsperspektiv. Jag pratade också till våra 18 skärmar och om Pasporta Servo. Därefter kom Roland Lindblom och hade en mycket kort kort kort språkkurs.

Vi hade fått bidrag från Eldona för att dela ut boken "Språket över gränserna" och vi informerade om sommarkurserna.

Allt detta klämde vi in på 30 minuter.

Kaisa Hansen

Esperanto Desperado i Bergsjön

Fredagen 30 januari uppträdde den danska esperantomusikgruppen EsperantoDesperado vid nyinvi-ningen av köpcentret vid Rymdtorget i Bergsjön (Göteborg). En handfull av Göteborgs esperantister var där för att lyssna tillsammans med några hundra av den lokala befolkningen. Framförandet verkade vara uppskat-

tat även av den icke esperanto-kunniga majoriteten av åhörarna. Gruppen framförde några av sina kända esperantolåtar, tillsammans med andra låtar.

EsperantoDesperados hemsida: www.esperanto.dk/desperado/despomainEsp.htm

Andreas Nordström

En resa i södra Afrika

Tisdag 24 februari i Vänskapens vecka hade ett tiotal av medlemmarna i Göteborgsklubben samlats i föreningslokalen för att höra Anita Dagmarsdotter berätta och visa bilder från sin resa i Zimbabwe, som hon gjorde i december-januari. Hon visade bilderna på sin bärbara dator och berättade bl.a. om besök vid stora vattenfall, om den fantastiska naturen med märkliga växter och djur och om vädret med tropiska regnskurar. Tillsammans med en väninna bodde hon i ett enkelt hus vid en missionsstation ute på landsbygden långt från närmaste butik. Tillgången på bensin var mycket knapp för deras bil, så de fick räkna ut ner till minsta kex hur mycket de kunde äta per dag, för att maten skulle räcka till nästa inköpsrunda. Hon berättade också om den svåra situation befolkningen befinner sig i efter de senaste årens misshållning av landets ekonomi, med en enorm inflation och utbredd kriminalitet, samt om biståndsarbetet mot HIV och AIDS där nere. Bl.a. skänkte man en ny "plugilo" (plog) till invånarna i en av byarna. En av åhörarna tyckte Anita sa "flugilo" (vinge) och undrade vad byborna skulle med en sådan till, till stor muntration bland åhörarna. Det hela var ett intressant och gemytligt program.

Andreas Nordström

Sändlista för esperantister

Du är väl med på sändlistan för svenska esperantister, svesp-l? Man kan komma med på den genom att skriva in sin e-postadress i formuläret på <http://www.esperanto.se/svesp-l/>

Pri someraj kursoj

Ni revenu al Lesjöfors kaj la somera kurssemajno 2003. La paroligan grupon partoprenis sep diversaguloj. Ili jene priskribis siajn travivaĵojn, parte forme de taglibro, kio estis ĉiutaga tasko:

* Mia edzino kaj mi decidis iri al EsperantoDomo por plibonigi nian lingvokapablon antaŭ la UK en Gotenburgo. La semajno plene sukcesis. La gastejestro Lennart nin bonvenigis kaj provizis per litaĵoj. Bonan ĉambron ni ricevis - ĉio bona! Ni konatiĝis kun la aliaj kursanoj kaj la helpantoj en la kuirejo kaj aliloke. Ĉie regis harmonio kaj kontento. Tamen, aparte menciindas Lennart, kies bonkoreco kaj diligento ŝajnis ŝvebi ĉie en la domo.

Nia kurso bone funkciis, lerte gvidata de Anna-Maria. Evidente ankaŭ la du aliaj kursoj estis sukcesaj. Dum la lasta vespero la infanoj fiere kaj lerte prezentis, kion ili lernis. La tabloj estis feste aranĝitaj. Ni vegetaranoj, eĉ pli ol kutime, povis ĝui multspecajn bongustajn fruktojn.

Konstatendas ke en- kaj eksterdome regis bona etoso. Por ni nur unu afero malsukcesis: ni ne trovis la banlagon. Bone, ni revenos por ĝin trovi!

Andre Skovrind, Danio

* Matene mi ĝoje rimarkis ke miaj sandaloj dumnokte sekiĝis. La lecionoj estas bonaj. Mi multe lernas kaj konsciiĝas ke mi pensas esperante. La vegetarano manĝaĵo estis bonega - ĝi konsistis el tomatoj, terponoj kaj sojofifstekoj.

Dum la leciono ni aŭdis poemojn de Aira Kankkunen. Laŭ ŝi la betulaj branĉoj havas violan vualon. Mirinde! Oni diras ke homoj sur certa evoluŝtupo kapablas vidi la naturon viole. Mi mem sopiris al la naturo kaj post la lecionoj ni iradis kaj iradis. Ĉe la fino de vojo ni trovis lagon kun floroj sur surface. Mi vidis, ke homoj ĉi tie uzas duoninsulon ligitan kun alia duoninsulo kiel banpoton. Ni promenis sur relvojo - Andreo unue, por forpeli serpentojn! Laŭ la fervojo abundis floroj multkoloraj - vidi ilin similas al soifanto kiu ricevas akvon.

Por vespermanĝi estis kvin diversaj fruktoj - vidaĵo same kortuŝa kiel la floroj laŭvoĵaj! Dum du horoj mi faris la hejmtaskon.

Bente Skovrind-Drelling, Danio

Daŭrigo en p. 9.

Rakonto de Sarajevo

En la koro de Bosnio kaj Hercegovino, en multnacieca kaj multkultura urbo Sarajevo, de la 21a ĝis la 27a de marto 2004 okazis seminario pri interkultura lernado, projektmastrumado, kaj instruado de esperanto. La seminari- on kunorganizis E@I/TEJO kaj ILEI kaj 39 personoj el 17 landoj partoprenis. Eble la sveda grupo estis la plej multnombra, kaj inter la svedaj partoprenantoj troviĝis tri estaranoj de SEJU: Torun Jansson, Håkan Lundborg kaj Daniel Granello.

La urbo Sarajevo troviĝas en montara regiono, kaj la centro de la urbo estas ege bela kun multaj malnovaj moskeoj, sinagogoj kaj preĝejoj (ortodoksaj kaj katolikaj). Kvar fortaj miljaraj kulturoj fluis en la regiono kaj agis en diversaj tempoj kun diversaj tempodaŭroj. Pro tio, komuna epiteto por Sarajevo estas "la Jerusalemo de Eŭropo".

La interkultura parto de la seminario temis pri la malfacilaĵoj kompreni unu la alian inter homoj el diversaj kulturoj. Ni aŭskultis prelegojn, roludis kaj diskutis pri antaŭjuĝoj kaj kiel eviti ilin. Estis ege interese diskuti interkulturon en multnacieca grupo, ĉar multaj el la partoprenantoj rakontis pri iliaj propraj spertoj.

Dum la parto de la seminario, kiu temis pri projektmastrumado, Manca

Turk el Slovenio lernigis nin pri diversaj subteneblecoj por junularaj organizoj en Eŭropo. Ni cerboŝturmis pri eblaj kaj ne eblaj projektoj en la mondo de esperanto. Ŝajne multaj junaj esperantistoj revas pri senfina esperanto-traĵno, kiu vojaĝas per la mondo kaj neniam haltas! Post la revado Manca detale priskribis la fondaĵojn de la Konsilo de Eŭropo, Eŭropa Komisio kaj aliajn subteneblecojn por junularaj organizoj en Eŭropo.

Birke Dockhorn el Germanio gvidis la instruistan kurson dum la seminario, kun kelkaj prelegoj de Rade Rado- vic kaj la famega Bertilo Wennergren. La partoprenantoj de la instruada grupo lernis kiel plani lecionon, kiel klare klarigi novajn temojn, kiel teni la intereson de la lernantoj, kaj plej grave, kiel esti fleksebla dum instruado de kurso. La partoprenantoj ŝajnis ege kontentaj post la kurso!

La semajno en Sarajevo estis ege agrabla kaj utila! Ni havis bonegan tempon kune kaj lernis multe pri interkulturo, projekt-mastrumado kaj instruado de esperanto. Eble eĉ plej grave, ni renkontis multajn interesajn kaj ĉarmajn junajn esperantistojn el la tuta mondo. Por mi estis ankoraŭ unu pruvo de la grandega utilo de Esperanto!

Pri someraj kursoj

Daŭrigo de p. 8.

* Interesajn kaj kortuŝajn travivaĵojn ni havis, kaj kune, kaj unuope. Pri tio temis niaj taglibroj verkitaj dumkurse, kaj ĉiun matenon ni prezentis niajn hieraŭajn spertojn. Ofte la prezento kaŭzis gajajn ridojn, aplaŭdojn aŭ eĉ pripensemon.

Sed, kiel vi jam scias, taglibroj estas loko por sekretaj pensoj: pro tio mi nenion plu povas malkaŝi...

Mikael Rydholm

* Dum nia kurso ni legis *Kion Aĵn, facila rakonto* de Sten Johansson. La libreto temas pri kelkaj genunuloj

partoprenantaj en festivalo. Unu estas Viktor, rusa gitaristo. En la festivalo li enamiĝas al sveda knabino, Gabriella. La problemo estas, ke ankaŭ lia amiko, la italo Kamilo, enamiĝas al ŝi. Komprenoble Gabriella mem amas nek Viktor nek Kamilo. Ŝi okupiĝas pri Jan el Nederlando.

La libro estas interesa, amuza kaj bona instruilo. La lingvaĵo de Johansson konsistas el la praktike uzata, parolata, do vivanta Esperanto. Faciligas la legadon glosaro kun klarigo en Esperanto post ĉiu ĉapitro. La libro rekomendindas jam post lernado de la plej bonaj vortaro kaj gramatiko.

Olesia Bertse

IJK i Ryssland i sommar!

Mer än 320 personer har redan anmält sig till årets största ungdomskongress i esperantovärlden. IJK (Internacia Junulara Kongreso) går av stapeln den 10:e juli 2004 i Kovrov, som ligger ca 30 mil öster om Moskva. Bland de anmälda finns glädjande nog redan omring 10 svenska ungdomar! Mer information om IJK 2004 finns på <http://www.tejo.org/ijk/>. På SEJU:s hemsida finns information om IJK på svenska för ungdomar som inte ännu riktigt behärskar esperanto.

Grattis till Märthastipendiet!

Eftersom Märthastipendiet aldrig delades ut 2002 har SEJU:s styrelse beslutat att dela ut två stipendier i år. Stipendierna för 2004 har gått till Joakim Lilljegren och Martin Wiss, båda hemhörande i Umeå. Joakim och Martin är båda relativt nya inom esperantorörelsen och har blivit tilldelade stipendium för att delta i IJK i Ryssland i sommar.

SEJU gratulerar!

Samtidigt vill vi passa på att tacka Jönköpings Esperantoklubb för er fina donation till Märthastipendiet!

Daniel Granello
ordförande i SEJU

En mia taglibro estas la dua tago en EsperantoGården aŭ laŭ ĝia nova nomo EsperantoDomo. Mi estas ĉi tie kun miaj du fratinoj kaj patrino. En la plej malfacila grupo mi estas kaj kelkfoje pensas, ke mi ne taŭgas en tiu grupo kaj ke por la aliaj ĉio estas tre facila. Hodiaŭ ni havis novan kursgvidanton. Dum ĉiuj antaŭaj jaroj mia patrino gvidis tiun grupon. Mi kredas, ke mia komenco estas sufiĉe bona kaj mi esperas, ke post ĉi tiu semajno mi parolos pli bone

Erik Bertse

Daŭrigo en p. 11.

Nia sveda sanktulino sankta Birgitta

Dua parto

TACK

Svenska Esperanto-förbundet framför härmed sitt varma för alla generösa gåvor. **Gåvor är alltid välkomna till SEFs postgiro 2012-3.**

Ett särskilt tack riktar vi till alla i **RONDO LANGLET**, som därmed ger SEF en stabil månatlig inkomst. Medlemmar i Rondo Langlet, är de som via **autogiro** skänker 100 kr eller mer per månad eller mer än 1200 kr i början av varje år.

RONDO LANGLET från år:

2001

Sten-Anders Hannnerz
Leif Nordenstorm
Lennart Sundman

2002

Ingrid Göransson,
Signhild Johansson
Tore Johansson
Göran Lundgren
Bengt Nordlöf

2004

Kristine Fossevall
Ole Hansen
Kaisa Hansen
Claes-Göran Ingstedt
Anita Bergh

Ni är alla välkomna att ansluta er till **RONDO LANGLET**. Anmäl dig till kassören Kaisa Hansen Tel: 08-590 88 210 eller e-post Kaisa@esperanto.se så får du en blankett överskickad.

La unua parto publikiĝis en La Espero 2004:2.

Dum la terura pesto en Avinjono, kien multaj malfeliĉaj rifuĝis, forpasis sepdek mil homoj, inter ili naŭ kardinaloj. Pri la papo Inocento Birgitta skribas, ke li estas pli abomeninda ol la judaj uzuristoj.

Birgitta iris al Asizo, la urbo de Francisko kaj restis tie kvin tagojn, dum ŝi faris sin sperta pri la grandaj memoraroj de la loko. Kune kun siaj kamaradoj ŝi iris en la preĝejo por konfidi sin en la ŝirmado de la sanktulo dum la vojaĝo. Ŝi sentis simpatian kun la franciskanoj kun kiuj ŝi havis grandan solidarecon. Birgitta estas portretita inter Fransiskanaj sanktuloj.

Birgitta restis plurajn jarojn en Napolo. Ŝi deziris vidi ĉiujn gravajn pilgrimajn lokojn de la urbo. Granda morala disfalo regis ĉirkaŭ la vivĝoja reĝino Giovanna.

La politiko en la hejma lando

Hejme en Svedio regis granda malkvieteco kaj dissplitiĝo. La reĝo Magnus Eriksson havis pli grandajn malfacilaĵojn por majstri. La plej aĝa filo de Birgitta, Karl, ludis grandan rolon, kiel sveda politikisto kaj ankaŭ kiel peranto de leteroj al la patrino. La tutan tempon oni atendis, ke Birgitta revenus, post kiam ŝi devigis la papon reveni al Romo.

La sveda reĝo estis arestita de la sveda nobelaro. Kiel regento proklamigis lia filo, la norvega reĝo Håkan. 1362 li estis elektita kiel sveda reĝo sur herbejo apud Upsalo. Skanio perdiĝis al Danio. Dum revalacio Birgitta eksciis, ke Skanio por ĉiam povus aparteni al Svedio. Tio plenumiĝos tri jarcentojn poste. En la jaro 1362 li realigas la donacon de la reĝa bieno de Vadstena al la monaĥeja institucio, kiun lia patro reĝo Magnus difinis en la testamento. Birgitta parolis kun trankvila aŭtoritato kaj kun granda psikologia sciado. Ŝi neniam dubas malkaŝi sin.

Karl IV (1316 – 1372) iĝis germana imperiestro 1346. Li estis la plej simpatia, saĝa kaj sukcesplena inter ĉiuj germanaj imperiestroj. Li venis al Romo printempe 1355 por kroniĝi de papa sendito. Birgitta atendis ĝis ŝi povis renkonti la papon, la imperiestron samtempe en Romo, kio post iom da tempo okazis.

La imperiestro Karl revenis aŭtune 1368 kaj tiam kune kun la papo Ur-

bano V. Estis historia momento, kiam ŝi povis prezenti sian monaĥejan projekton.

Estas la ĉiam repetita, neŝanĝebla opinio de Birgitta: ŝia kongregacio estas la propra faro de Dio, ĝi estas por ĉiam konfirmita en la ĉielo, nur bezonas la sankcion de la papo, por ke ĝi validu inter la homoj. Urbano V estis elektita unuanime 1362. Li ĉesis la pompon, kaj la malŝparadon, kiu pli frue karakterizis la papan kortegon en Avinjono.

Birgitta admonis siajn filojn Karl kaj Birger veni al Romo por fortigi ŝian pozicion, ambaŭ estis en Svedio alte rangitaj kaj eminentaj viroj. Imperiestro Karl kaj la papo Urbano fine ambaŭ venis al Romo. Magnus Petri rakontas, ke li ĉeestis kiam Birgitta rakontis al la papo kion Dio aperigis al ŝi, multaj atestantoj aŭdis tion, inter aliaj membro de la dinastio Orsini.

Birgitta havis certecon, ke ŝi estis vokita de Dio por unika farado de sama speco kiel ekz.. la disĉiploj.

Inter samlandanoj en Italio

Birgitta estis tute ne sola en sia domo. Ni konas la nomojn de pluraj el ŝiaj servistinoj. Ni scias kiuj svedaj monaĥoj, kiuj pli longan aŭ pli mallongan tempon loĝis tie. Pluraj riĉaj kaj multinflujaj svedaj viroj kaj virinoj estis ŝiaj gastoj. La bopatrino de la filo Karl, Ingeborg Eriksdotter kiel vidvino venis al Romo la saman jaron kiam Birgitta translokiĝis al sia nova hejmo.

La kavaliro Magnus Petri venis al Romo post la morto de sia edzino kaj restis ne pli ol 18 jarojn, servante Birgitta. Li estis unu el la plej bonaj atestantoj.

Romaj geamikoj

Profunde ofendita kardinalo kaj episkopo trovis konvene doni ŝiajn vortojn disvastigon en la paroĥo. Ŝi estis malamiko de Romo, kaj estis tute freneze, ke tiu norda virino povis loĝi en pompa kardinala palaco.

Kvar jarojn post la alveno de Birgitta al Romo aperis la anstataŭanto de la kardinalo de Beaufort ĉe Birgitta, kaj informis strikte ke ŝi devis toleri forlasi la palacon kaj serĉi alian loĝejon. Vere Birgitta kaj la papoj estis en akordo – Romo estis antaŭ ĉio urbo de peko kaj dekadenco.

Birgitta nun ricevis grandan donon ĉe la periferio de la urbo. Eble tiu nivelo ebligis por ŝi konatiĝi kun la

aristokrataj familioj de Romo, precipe la granda kaj potenca familio Orsini.

Post la reveturo de Urban al Avignon kaj lia morto elektigis nova papo sub la nomo Gregorio. Tiam Birgitta faris sian eblon instigi la papon resti en Romo kaj ne reveni al la abomenata Avignon.

Unu el la plej observataj mirkuracoj okazis en Napolo 1365. Sinjorino Lapa troviĝis en pilgrima veturo en Napolo, kiam ŝia dekjara filo Esau iĝis ege malsana. Ŝi alvokis Birgitta kaj petis ŝian helpon. Birgitta tuŝis la korpon de la knabo kaj krucosignis lin, post kiam li resaniĝis.

En Napolo kaj Cipro

La 10-an de marto 1372 Birgitta kun siaj gekamaradoj supreniris la ŝipon, kiu transportos ilin de Napolo al Palestino. La unua haltejo estis Cipro. La episkopo Alfonso rakontas pri la paniko, kiu regis, kiam la ŝipo trafis en mar danĝeron, sed Birgitta havis neŝanceblan trankvilon. La reĝo de Cipro ankaŭ estis formale reĝo de Jerusalemo, kiun li ne povis administri. Birgitta kunvokis la reĝinon kaj ŝian filon, eminentajn baronojn kaj altajn oficistojn en Nicosia kaj havis tie paroladon.

Legante la propran manuskripton de Birgitta, oni trovas, ke ŝi faris grandiozan paroladon. Ŝia parolado estis zorge ellaborita kaj elokventa. La antaŭdiroj de Birgitta pri la tuta ruiniĝo de Cipro praviĝis. La militŝiparo de Genua okupis kaj prirabis Famagusta.

Palestino

Malmultaj el la revelacioj de Birgitta estas tiel multe legitaj kiel ŝia priskribo de la Jesua naskiĝo. Dum sia tempo en Palestina Birgitta malsaniĝis. Ŝi devis pro febro kaj senforteco resti plurajn monatojn. Evidente ŝi ne poste resaniĝis de tiu malsano, kiu estis ŝia lasta.

Denove en Napolo kaj ŝia morto

Post monato en Napolo rajdis Birgitta kun sia societo al Romo, kie ŝi venis al sia loĝejo. La 18-an de julio Birgitta ricevis revelacion, kie Kristo antaŭdiris la tagon kaj horon por ŝia venonta morto. Katarina dormis en la ĉambro apud sia patrino. Ŝi tiam petis la prioron Petrus Olavi veni, kiu donis al Birgitta la sakramentojn kaj la lastan sanktoleadon. Li povis transpreni ĉiujn skribaĵojn de Birgitta por

TACK

Gåvor, speciellt som stöd för barn och ungdomar till minne av **Boomee Kim Lindblom** har totalt inkommit 6.200 kr. I år tackar vi:

Rune Moln
Leif Holmlund
Åke Ahlrén
Birgitta Ekvall
Dag Ellard
Jan Setreus
Roland Lindblom
Andreas Nordström

Övriga gåvor har i år kommit 2.758 kr vi tackar:

Jadviga Larsson
Thordis Samuelsen
Kalmar-klubben
Jarl Hammarberg
Wim Posthuma
Rune Ekmark

Till minne av **Ingrid Ottosson** som gick bort i april 2004 har det inkommit 100 kr vi tackar
Kerstin Himell

redaktado.

Kiam Birgitta ricevis la lastan sanktoleodon, ŝi alvokis siajn konfesprenantojn, Katarina kaj Birger kaj rakontis al ili, ke ŝi per propraj okuloj vidis Jesuon je la altaro en sia ĉambro. Kun la okuloj al la ĉielo Birgitta diris: "En viaj manoj, Sinjoro, mi transdonas mian spiriton" kaj en la sama momento ŝi endormiĝis.

Ŝi entombiĝis en Romo kaj estis transportita de Katarina kaj la frato Birger al Svedio. La tuta veturado de Romo al Vadstena postulis 7 monatojn.

11 jaroj post la morto de Birgitta, ŝia klaŭstra projekto estis realigita. En la jaro 1384 estis inaŭgurita la monaĥejo de Vadstena.

Arne Lundkvist

Por skribi mian prelegon unue en la sveda lingvo kaj poste tradukita esperanten kaj lingve kontrolita de Ebbe Vilborg, mi uzis tri librojn. Sven Stolpe skribis la plej detalan libron pri Birgitta. Li estis konata verkisto kaj kritikisto, ofte parolis en la radio. Li konvertiĝis al katolikismo.

Luca Cesarini estas sveda parohestro, kun kiu mi telefone parolis.

La tria verkisto estas Birger Bergh, kun kiu mi ankaŭ parolis. Li estis latina profesoro en Lund. Li diris al mi, ke dum la 1300-jarcento la latino komencis iĝi la italan lingvon kaj do Birgitta konis ambaŭ.

Pri someraj kursoj

Daŭrigo de p. 8 kaj 9.


* Diva, mia bona, kara hundino akompanis min al Lesjöfors. Ni okupis la solan ĉambron, kiu havas rektan aliron al ekstera hundejo. Matene, jam antaŭ matenmangĝo kaj lecionoj, ni kuras tra la bela naturo kaj poste ankoraŭ plurfoje promenas. La infanoj ĝojas renkonti Diva kaj ŝi menŝatas saluti la hundon de Lennart. Ankaŭ li estas granda amiko de la infanoj.

Karin Rylander

* Agrablan semajnon mi havis kaj interesan kaj variplenan kurson. Kuinte mi estas helpantino en la kuirejo kaj nur ĉeestas la lecionojn kiam mi havas liberajn momentojn. En la kuirejo kompreneble estis Lennart kaj Ĵin, kaj ni helpis nur kiam mi ne studis. Ankaŭ Mille, mia edzo, helpis, kiam li ne taksioforis.

Por venontaj aranĝoj mi havas proponon: Dum la kurssemajno Lennart kaj kvar personoj laboru en la kuirejo. La kvar laboru duope, ekzemple du antaŭtagmeze, du posttagmeze. Eble ĉiuj kvar bezonas labori kelkokaze. Tiuj kvar pagu nenion; ili studu duontempe kaj laboru duontempe. Tiel ankaŭ Lennart havus iom da libera tempo - eble por studi, ĉu ne?

Anne-Marie Milianowicz

Lennart Lagerkranz

Lennart esperantistiĝis en la jaro 1948. Li ekinteresiĝis pri Esperanto, sub influo de aktiva esperantistino Mariet Nilsson. Li komprenis ke Esperanto estas logika kaj tre facile lernebla lingvo. Li kaj lia edzino Ines finis Esperanto-kurson, sub gvidado de Geo Johansson kaj Viktor Bonde, sed ankaŭ lernis pere de koresponda kurso. Kiel jam sperta Esperantisto, li mem gvidis Esperanto-kursojn en Falun kaj Borlänge.

Li estis multjara membro de UEA kaj Sveda Esperanto-Federacio. Li aktive kunlaboris en la havigo de EsperantoDomo en Lesjöfors, kie li ankaŭ estis estrarano.

Mem li partoprenis multajn Esperanto-aranĝojn, plurajn svedajn Esperanto-kongresojn, sed ankaŭ internaciajn kongresojn ekzemple en Stokholmo, Bergeno (Norvegio), Helsinko (Finnlando), Vieno (Aŭstrio), Varsovio (Pollando), Sofio (Bulgario) kaj malproksimo en Tokio (Japanio) kaj Havano (Kubo).


Li sindone laboris kiel kasisto, kontumisto aŭ revizoro en diversaj Esperanto-organizaĵoj kaj kluboj. Tiujn taskojn li fake kaj sperte faris, ĉar la profesie estis kontumisto kaj kasisto.

En 1980 li devis - pro malsano - rezigni pri la posteno kiel prezidanto de la klubo en Dalarna, kiun taskon li transdonis al alia Esperanto-aktivulo Lennart Persson.

Grava malsano ĉiam pli malfortiĝis lin, kaj komence de la jaro 2003 li forlasis tiun ĉi mondon, surmane de sia sindona edzino.

Gloro al Lennart!

Vera Persson

Harold Brown

Harold Brown subite mortis la 10-an de marto 2004 tuj antaŭ sia 79-a datreveno.

Li verkis multajn librojn kaj artikolojn en esperanto. Li ofte prezentis prelegojn kaj programojn en esperanto dum siaj vojaĝoj al diversaj landoj kaj gvidis interesan kulturan vesperon dum la jarkongreso en Oskarshamn. Kelkaj el liaj pluraj originale verkita teatraĵoj estas prezentitaj diverselande de la konata aktoro Jerzy Fornal.

Li postlasas du librojn verkitajn en la angla lingvo. Mi deziras ke liaj vortoj kaj lia memoro vivu. Pro tio mi volas presigi etan eldonon de ili kaj petas al vi, kiuj volas memori Harold per legado de liaj vortoj anonci vin al mi tre baldaŭ por antaŭmendo de liaj libroj, tiel ke mi povas kalkuli la eldonnombrojn. (Vidu la sekvantan paĝon.)

Ambaŭ libroj en diversaj manieroj temas pri la arto vivi, pri la malfacilaĵo kaj feliĉo vivi. Ili estas skribitaj en facila, flua, intima angla lingvo. Estas kvazaŭ Harold sidas apud vi, parolas kaj rakontas al vi.

Kelkajn tagojn antaŭ lia morto Lars Forsman sidis kune kun Harold kaj ili diskutis la neceson eldoni tiujn librojn. Harold tre ĝojis pri tio ke liaj vortoj pluvivos inter liaj geamikoj.

Dum siaj du lastaj jaroj Harold vivis kun la damaĝoj post apopleksio kaj havis tre gravan afasion. Malgraŭ tio Harold interesiĝis pri multo kaj provis vivi riĉan kaj feliĉan vivon ĝis la fino. Pro tio mi deziras ke vi per legado de liaj libroj lasu Harold kaj lia memoro daŭre vivi inter ni.

Per tio lia vivo estos plenumita.

Kerstin Rohdin

Harold Brown verkis angle

Harold Brown: Five Self Portraits. 150 SEK

Vizitante la Popolan Altlernejon de Karlskoga, Svedio, Harold Brown antaŭ la studantaro en plenplena aŭlo vekis kaj konsternon kaj entuziasmon:

-Ĉu estas eble kaj dece, ke anglo faras duhoran prelegon - en Esperanto?

Jes, pensiuliĝinte Harold Brown ekloĝis en Svedio kaj ludis aktivan rolon en la sveda E-movado, verkis teatraĵojn, tradukis librojn kaj faris prelegvojaĝojn. Ni memoras verkojn kiel "Eduka Danĝero kaj Emilo en Smolando.

Kompreneble kiel anglo li verkis ankaŭ en sia gepatra lingvo. Mi ĵus legis lian "Five Self Portraits" - ekscitan majstraron. Por kapti la leganton li ne bezonas kiel multaj aliaj verkistoj skribi pri murdoj, skandaloj, malmoralaj aŭ laŭiri kutiman rakontmanieron. Ne, li kreas mozaikon, same neatenditan kiel belan.

Fulmrapide kaj elegante - tiel ke la leganto ne tuj observas la novan - li iras de infanaĝo al nuna tempo, de ĉiutagaj aferoj al la monda literaturo, de militservo al lernejoj, de trankviliga hejma pianludado al Londona koncerteja salono, de propra pentrado al konataj mondartistoj. Jes, mirinde li nin translokas al aliaj tempoj kaj lokoj kaj reen. La streĉe interesa enhavo ne sekvas ĉapitrojn aŭ kronologian sinsekvon kaj ĝuante la rakontadon oni neniam scias, kio okazos sur la sekva paĝo. Oni ne povas ne daŭrigi la legadon.

En sia serĉado de senco de la vivo li gvidas nin per siaj internaj vojaĝoj. En demandoj kiel "Kien survojas la homaro" aŭ "kial ni vivas" ni spertas la maturecon kaj humanismon de nia samideano. Li ofte reiras al la deziro denove renkontiĝi kun siaj gepatroj:

- Sur mia skribotablo kuŝas lenso de motorcikla reflektoro, kiun mia patro kunportis de eksterlanda militservo. La lenso mia oldiĝinta panjo uzadis kiel lupeon kiam ŝi legis la matenan ĵurnalon.

Certe la riĉa interna vivo de Harold Brown faciligis por li elteni la lastan periodon de sia vivo, kiam lin trafis afazio. La libro vere legindas por esperantistoj, kiuj volas honori lin kaj

esprimi dankon pro lia verda pensmaniero kaj nobla internacia agado. Kaj certe multe da Londonklubanoj konas Harold de fruaj jaroj aŭ legis lian "Leteroj el Svedio". Do, vi nun povas renkonti lin denove per tiu ekstraordinara kaj unika libro.

La libro antaŭmendeblas ĉe Kerstin Rohdin, Garvargränd 6, SE-579 30 Högsby, Svedio aŭ per telefono 0491-20461

La prezo estos SEK 150 kronoj kaj la sama prezo por "Always summer" kiu eldoniĝos samtempe. Por la du libroj 250:- /inkl. sendokostoj/.

Lars Forsman

Prezidanto de la Sveda Esperanto-Instituto

Literatura numero de La Espero

Laŭplane tiu ĉi numero de La Espero devus esti duobla numero 2004:3-4. Vi verŝajne jam vidis ke la numero estas nur unuopa numero.

La kialo estas simpla. La redaktoro ne sukcesis kolekti materialon por duobla numero.

Tamen mi klopodos fari duoblan numeron venontfoje. Granda parto de La Espero 2004:4-5 konsistos el literaturaĵoj.

Tial sendu al mi:

* Originalajn prozaĵojn kaj poeziaĵojn.


* Tradukojn (se vi havas permeson de la aŭtoro aŭ de liaj/ŝiaj posteuloj, se la verkinato mortis antaŭ malpli ol 70 jaroj.

La literaturaĵoj devas esti en bona Esperanto. La redaktoro de La Espero ne konsentos lingve korekti literaturaĵojn.

Sendu ĝis la 15a de aŭgusto, prefere pli frue kaj prefere interrete al

nordenstorm@glocalnet.net aŭ al: Leif Nordenstorm, Järnvägsgård 11, 961 76 Boden.

Leginda facilaĵo



Sten Johansson: Katrina malfruas. Facila rakonto. 48 p. Al-fab-et-o, Skövde 2004. 36 SEK.

Mi tuj konfesu ke mi komencis legi "Katrina malfruas" ne ĉar mi atendis ke mi ĝuos ian altkvalitan literaturon legante facillingvan libron, sed ĉar mi recenzu la libreton por La Espero. Baldaŭ min tamen kaptis la interesaj okazaĵoj kaj mi ne volis ĉesi legi, ĉar mi tre scivolemis pri la fino.

Ĉu Katrina sukcesos kontakti sian patron, kiun ŝi neniam renkontis? Kaj...? Ne, mi ne malkaŝu ion pli pri la enhavo de la libro.

Do, Sten Johansson denove sukcesis. En Esperantio facilaj rakontoj estas gravaj, ĉar la plej multaj esperantistoj ne flue legas la lingvon, kaj ne volas legi dikegajn romanojn. Plej multaj esperantistoj pli volonte legas facilajn rakontojn, kiuj donas al la leganto kaj legoĝuon kaj pli bonan lingvon.

"Katrina malfruas" oni povas legi sola, en kurso aŭ en kluba kunveno.

Leif Nordenstorm